- Márta Kovács, Salamonné Pálma Csiszár, dr. László Szabó.
- internacia lanĉo de la novaj KER-ekzamenoj, akiro de ŝtata agnosko ankaŭ por la unu-lingva versio en Hungario, ekde 2009.

Kotizoj: la samaj, kiuj por la du-lingva versio en Hungario (pageblaj, pagitaj jam de dekmiloj da hungaroj), similaj, eĉ iom malpli kostaj ol aliaj prestiĝaj internaciaj ekzamenoj en aliaj fremdaj lingvoj, internacie subvenciataj laŭ la MA kotizoj de UEA (por ioma komparo: Cambridge First Certificate /B2 nivelo/ kostas 150 eŭrojn).
IEK: nek elektas siajn ekzamenantojn (IRE) laŭ la akreditigaj postuloj, nek havas trejnsistemon, pluklerigadon por ili.
Rekompencoj: nek la ellaborintoj de la tute novaj KER-ekzamenoj, nek la fakaj gvidantoj, nek la organizantoj de testsesioj, provtestistoj, korektantoj de centoj de provtestoj, administradon, statistikojn, korektadon farintaj, farantaj gekolegoj, plibonigantoj de la sisemo, ktp, ktp, ĝis nun ricevis iun ajn financan rekompencon por la pli ol dujara laboro, do ĈIO LAŬ VOLONTULA BAZO, DONACO POR LA ESPERANTO-MOVADO!!!!
Malgranda teamo investis sian tempon, energion kaj centojn da laborhoroj....
La nova KER-ekzamensistemo estas je dispono por ĉiuj. Sur la hejmpaĝo de ITK (http://itk.hu ) aperis elektebla verda steleto, kiu gvidas al la internaj paĝoj, kie eblas legi la postularon, detalojn pri ĉiuj tri niveloj: http://itk.hu/index.php?id=322&fomenu=322&lang=ept
Ekzamendatoj, informoj pri kotizoj, aliĝilo al la novaj UEA-ekzamenoj:
http://edukado.net/pagina/NOVAJ+UEA-EKZAMENOJ/22422//
Ni esperas, ke multaj eluzas la bonan ŝancon jam ĉi-jare akiri atestilon en la niveloj B1, B2 aŭ C1.
Sukcesojn !
Kun multaj salutoj, Zsófia Kóródy
Interkultura Centro Herzberg http://esperanto-urbo.de
fonto: Ret-Info http://www.eventoj.hu

# Propono de UEA pri Esperanto al kvar mondaj gvidantoj

La 16an de junio okazis en la rusa urbo Jekaterinburgo la unua pintkunveno de Brazilo, Rusio, Hinda Unio kaj Ĉinio. Tiuj kvar landoj intencas kunlabori pli intense kaj elpaŝi kune en la monda politiko. En Jekaterinburgo, kie la ĉefa temo estis la nuna ekonomia krizo de la mondo, renkontiĝis la ŝtatestroj Dmitrij Medvedev el Rusio, Luiz Inacio Lula da Silva el Brazilo kaj Hu Jintao el Ĉinio, kaj la barata ĉefministro Manmohan Singh.
Post la kunveno la prezidanto de UEA, prof. Probal Dasgupta, skribis al la kvar gvidantoj, karakterizante la eventon kiel historian. "Ekonomia krizo okazigita alilande trafas viajn landojn grave, ne nur pro la nekredeblaj riskoj kaj ŝuldoj alprenitaj en Usono, sed ankaŭ pro la fakto, ke la valuto de nur unu lando rolas kiel internacia valuto", li komentis la temon de la kunveno. Per tio li samtempe enkondukis proponon:
"Universala Esperanto-Asocio proponas al vi la ideon, ke valutoj kaj lingvoj funkcias sam-maniere. La internacia uzo de la angla plifortigas nur kelkajn privilegiitajn landojn kaj samtempe starigas riskojn kaj kostojn por ĉiuj aliaj. Ĉu tiaj privilegioj, valutaj kaj lingvaj, kondukis nin al pli bona mondo? Ĉu la kostoj estis efikaj? Certe ne."
"Viaj kvar landoj estas promesaj landoj por la estonteco. Sed vi, kiel ni tra la tuta mondo, devas ĉesigi la valutajn kaj lingvajn privilegiojn, se ni volas progresi rapide, malpli koste kaj harmonie. Pri nova valuta sistemo, vi jam havas ideojn kaj proponojn. Por nova lingva sistemo, ni proponas Esperanton kiel efikan, pragmatan kaj malpli kostan solvon."
La letero de prof. Dasgupta estis sendita al ĉiu ricevanto en ties propra lingvo.
laŭ Gazetaraj Komunikoj de UEA, n-ro 332, 2009-06-26